# Vertikale

Trimonata periodaĵo por la aktivuloj de FEL

Numero 6
Decembro 1994



**Flandra Esperanto-Ligo**

**Estraro:**

| | |
|---|---|
| Prezidanto: | *Wim De Smet* |
| Vicprezidanto: | *Alex humet* |
| Anoj: | *Roland Rotsaert* |
| | *Ivo Durwael* |
| | *Ingrid Lievens* |
| | *Johan Van Eenoo* |

**Komisiitoj:**

| | |
|---|---|
| Financoj: | *Roland Rotsaert* |
| | *Paul Peeraerts* |
| | *Gerd Jacques* |
| Eldona agado: | *William Auld* |
| | *Gerrit Berveling* |
| | *Chris Declerck* |
| | *Rejna de Jong* |
| | *Alex Humet* |
| | *Paul Peeraerts* |
| Instruado: | *Raymond Wylieman* |
| Dokumentado: | *Marc Vanden Bempt* |
| Rebato servo: | *Germain Pirlot* |

**Oficejo**
La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Ĝi estas malferma por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj 12a30 kaj inter la 13a30 kaj 17a30. Vizitantoj bonvolu tamen anticipe interkonsenti pri rendevuo.
Telefono (oficĥoroj): (03) 234.34.00
Telekopiilo (tagnokte): (03) 233.54.33

La ĝenerala respondeco de la revuo restas ĉe la redaktoro, la verkistoj mem respondecas pri siaj propraj artikoloj aŭ raportoj, kaj la enhavo de ili ne devas kongrui kun la opinio de la redaktoro.

Vertikale, trimonata periodaĵo por la aktivuloj de FEL. Abonoj ĉe FEL.
Numero 6, apero: decembro 1994
Korespondadreso: Vertikale
Cor van Ekelenburg
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (oficĥore)

## Enkonduko

Finfine aperas nova numero de Vertikale, nun sub mia gvidado - ĉu taŭge, nur la estonteco montros tion.
Sed mi komencu per deziri al vi, la leganto, *Feliĉan Novjaron*, kaj ĉion bonan por vi kaj viaj proksimuloj.
Ĉar denove suficê da nomoj ŝanĝiĝis en la organigramo, mi realdonas ĝin en la mezaj paĝoj de ĉi tiu numero, tiel ke vi povas facile elpreni ĝin. Se restas ankoraŭ kelkaj eraroj, mankoj aŭ aliaj misaĵoj, sciigu min pri ili kaj mi ŝanĝos ilin por la venonta eldono.
Agu same pri novaĵoj, agadoj kaj aliaj sciindaĵoj, kaj sendu ilin al mi, adrese la FEL-oficejo.
Dankon jam antaŭe.

Cor van Ekelenburg.

## Nova regularo por subvenciado de kulturaj asocioj

Jam de pli ol unu jaro la ministerio pri kulturo estas ellaboranta novan regularon por subvenciado de kulturaj asocioj, kia Flandra Esperanto-Ligo.
La dekreto nun estas kvazaŭ preta. La flandra registaro aprobu ĝin antaŭ la fino de 1994; poste ĝi estos sendata al la flandra parlamento (Vlaamse Raad). Oni antaŭvidas ĝian akcepton je fino de februaro 1995.
Je la 14a de decembro 1994 BVVO (Bond Voor Vormings- en Ontwikkelingsorganisaties) organizis informkunvenon por la koncernataj asocioj, dum kiu oni disdonis klarigojn bazitajn sur la laste haveblaj tekstoj.
Evidentiĝis, ke FEL ja devos iom adapti sian agadon (i.a. FEL fukciu pli ol nun kiel kupola organizo, kiu strukturigas la aktivaĵojn de la grupoj) sed el financa vidpunkto verŝajne ne estos malavantaĝoj.
Ni esperas, ke dum la venonta ĝenerala kunveno eblos doni pli konkretajn informojn.

Roland Rotsaert.





## Protokoloj de FEL-kunvenoj

**Ĝenerala Jarkunsido, 94.03.26**

Loko: Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.
Dato: sabato, la 26a de marto 1994.

Ĉeestas trideko da membroj. Petis senkulpigon pro neveno Edward Symoens.

**1. Financa raporto pri 1993**
Paul Peeraerts, direktoro de FEL, klarigas la bilancon kaj spezokonton (vidu aldonaĵon) kaj respondas al demandoj, faritaj de kelkaj membroj.
La spezokonto finiĝas per deficito de iom pli ol 440.000 frankoj. Roland Rotsaert, estrarano pri financoj, reklarigas la kialojn de tiu deficito (vidu ankaŭ la raporton prepare al la speciala kunsido en Loveno, la 13an de februaro) kaj proponas, ke rezervo de 400.000, kiu estis kreita por aĉeto de nova komputilo, nun estu aldonita al la ĝeneralaj kostoj. Tiu komputilo estis aĉetita en 1993 kaj estis deskribita por unu kvinono en la 31a de decembro 1993. Tiu propono estas unuanime akceptita kaj la financa raporto aprobita.

**2. Sekretaria raporto**
La sekretario ne liveris raporton. Ekzistas iom da konfuzo, ĉar tiel oni ne povas senŝarĝigi la malnovan estraron. Wim De Smet proponas, ke oni aranĝu specialan ĝeneralan kunsidon, kiu aprobu la raporton, kiam ĝi estos preta. Ivo Durwael kontraŭproponas, ke oni uzu la raporton kiu estas verkata nun por la subvencidosieroj, kaj aldonu ĝin al tiu ĉi protokolo. Tio ĉi estas akceptita unuanime.

Alex Humet, prezidanto depost 1992, prezentas sian adiaŭan paroladon en kiu li denove substrekas la fakton, ke la centro en Antverpeno kaj la grupoj kune formas FEL. Li tamen bedaŭras, ke li spertis gravan mankon de kunlaboro.

**3. Elektoj**
Neniu el la grupoj de FEL komunikis la nomojn de siaj proponitaj administrantoj antaŭ la limdato. La Ĝenerala Jarkunsido pro tio decidas doni al la grupoj lastan eblecon sciigi tiujn nomojn nun:

| | |
|---|---|
| La Pioniro: | Mari-Roza De Wolf |
| Esperanto 2000: | Ghislain Jacobs |
| | Roger Goris |
| La Erikejo: | Edward Symoens |
| Knokke: | neniu |
| La Konkordo: | Piet Glorieux |
| Limburgo: | Jef Geraerts |
| La Konko: | Lucien De Sutter |
| Paco kaj Justeco: | Johan Van Eenoo |
| La Progreso: | Katja Lödör |
| La Verda Stelo: | Ivo Durwael |
| | Jacques Schram |
| | Cor van Ekelenburg |
| | Jules Verstraeten. |

Al tiu listo aldoniĝas reprezentanto de FLEJA (Wim Slootmans), la redaktoro de Horizontaal (Guido Van Damme) kaj la direktoro de FEL (Paul Peeraerts). Entute do 16 administrantoj. Al tiuj 16 rajtas aldoniĝi maksimume unu triono, do 5 kooptitaj administrantoj. La eksiĝanta estraro proponas aldoni kiel administrantojn: Wim De Smet, Alex Humet, Ingrid Lievens, Roland Rotsaert kaj Raymond Wylleman. La Ĝenerala Kunveno krome proponas Jorg de Mulder kaj Henny Jacques.

Wim De Smet argumentas, ke oni ne proponu personojn kiuj ne ĉeestas, aŭ kiuj ne konsentis iĝi administranto. Ŝajne regas konsento pri tiu starpunkto. Pro tio estas forstrekitaj el la listo Raymond Wylleman kaj Jorg de Mulder.
La Ĝenerala Kunsido unuanime akceptas la 21 administrantojn por la periodo 1993-1994.
Post multe da pledado fare de diversaj ĉeestantoj, finfine kandidatiĝas por la Estraro Wim De Smet, Alex Humet, Ingrid Lievens, Roland Rotsaert, Jacques Schram kaj Johan Van Eeno. Tiu ĉi skipo estas unuanime akceptita kun unu sindeteno.
Estas decidita kun 12 voĉoj kontraŭ 4, ke la prezidantelektoj ne estos sekretaj.
El la estraranoj la administrantoj elektas kiel prezidanton por la periodo 1993-1994 Wim De Smet. Tiu ĉi elekto okazis unuanime kun tri sindetenoj.
La nova prezidanto dankas la administrantojn pro ilia konfido kaj certigas celkonscie plenumi sian rolon.

**4. Taskoj por la nova estraro/administrantaro**

**Ghislain Jacobs opinias,** ke dum la lastaj jaroj la administrantaro ne havis sufiĉe da taskoj. Wim De Smet promesas dum sia deĵorperiodo pli ofte kunvoki la administrantojn, ekzemple ĉiun duan monaton.

**En la lasta** numero de Horizontaal aperis la programoj de la grupoj de Peer kaj de Zonhoven. Tiuj grupoj ne jam petis aliĝon al FEL kaj sekve iliaj membroj, se ili ekzistas, ne estas membroj de FEL. Jef Geraerts petas starpunkton de FEL ĉi-rilate: ĉu grupo ne aliĝinta rajtas publikigi sian programon en Horizontaal? La prezidanto klarigas, ke li estis elektita nur antaŭ kelkaj minutoj kaj do ne jam povis esplori la aferon. Li promesas trakti la punkton dum la unua venonta kunveno de la Estraro.

**André Ruysschaert proponas,** ke en la adresaro en Horizontaal, la kupolaj organizaĵoj (FEL, BEFA, ECN,...) troviĝu ĉu antaŭe ĉu fine de la listo, sed ne sub la urboj kie ili hazarde havas sian sidejon.

**Herman Deceunick ripetas** la alvokon de Roland Rotsaert, por ke FEL publikigu projekton en la porlerneja dokumentaro Dynamo2.

**Paul Peeraerts petas** al la grupoj en kiu membro havas komputilon kun modemo, sciigi lastminutajn programŝanĝojn al la bultenejo de FEL, voknumero (03) 234 12 60 (inter la 19a kaj 7a horo, konektokriterio 8N1) por ke aliaj ankaŭ tie povu trovi tiujn sciindaĵojn.

**Paul Peeraerts sciigas,** ke la centro ĉiun duan monaton nun skribe avertos la grupojn, ke estas tempo por komuniki siajn programojn. Speciala formularo estis kreita ĉi-cele. La grupoj bv. komuniki al la centro al kiu adreso estu sendita tiu formularo.

Protokolis Paul Peeraerts

---

**Aldonaĵo**

Balans per 31.12.1993

AKTIEF

| | |
|---|---|
| Inventaris | 1.846.649 |
| Waarborgen | 97.500 |
| Voorraad boeken | 412.712 |
| Voorraad cursussen | 232.158 |
| Voorraad eigen uitgaven | 1.376.424 |
| Voorraad grondstoffen | 335.000 |
| | |
| Middelen lange termijn: | |
| Spaarrekening KB | 250.500 |
| Spaarrekening ASLK | 29.587 |
| | --------- |
| Totaal | 280.087 |
| | |
| Debiteuren | 1.691.334 |
| | |
| Liquide middelen: | |
| Zichtrekening KB | 199.461 |
| Zichtrekening post | 348.125 |
| Zichtrekening ASLK | 29.575 |
| Kas | 21.751 |
| Kas vreemde munten | 8.965 |
| Zichtrekening UEA | -10.213 |
| Zichtrekening Wachovia-bank | 78.071 |
| Internationale antwoordcoupons | 510 |
| | --------- |
| Totaal | 676.245 |
| | |
| Te ontvangen gelden | 1.170.641 |
| Reeds betaald voor 1994 | 106.171 |
| | |
| Saldo van het boekjaar | 448.617 |
| | |
| Saldo van het actief | 8.673.538 |

PASSIEF

| | |
|---|---|
| Vermogen | 1.292.973 |
| Rezerve voor machines | 400.000 |
| Rezerve voor herstellingen | 150.000 |
| Leningen | 1.773.801 |
| | |
| Fondsen: | |
| Uitgavefonds | 42.435 |
| Boekenfonds | 51.304 |
| Boekenbonnen | 11.744 |
| Informatiefonds | 114.127 |
| Fonds levenslange leden | 71.750 |
| Steunfonds Monato | 367.702 |
| Steunfonds Roemenië | 88.740 |
| Betalingen zonder herkomst | 24.314 |
| Rezerve medewerkers Monato | 9.590 |
| | --------- |
| Totaal | 781.706 |
| | |
| Crediteuren | 2.504.262 |
| | |
| Overgangsrekeningen: | |
| Totaal | 1.770.796 |
| | |
| Saldo van het passief | 8.673.538 |





Kostenrekeningen

| | | |
|---|---|---|
| 1a. | Salarissen personeel | 2.584.540 |
| | Salarissen DAC | 94.485 |
| | Salarissen gewetensbezw. | 24.000 |
| | Belasting op personeel | 3.000 |
| | Verzekering personeel | 40.713 |
| | Salarissen totaal | 2.746.057 |
| 1b. | Sociale lasten | 768.157 |
| 1c. | Uitbesteed werk | 35.510 |
| | | |
| 2a. | Huur gebouwen | 232.260 |
| 2b. | Onderhoud | 6.663 |
| 2c. | Verzekering | 28.519 |
| 2d. | Belasting | 12.359 |
| 2e. | Verwarming | 31.206 |
| 2f. | Water | 8.609 |
| | Elektriciteit | 84.612 |
| | Water en elektr. totaal | 93.221 |
| 2g. | Schoonmaak | 31.260 |
| 2h. | Kantoormaterieel | 543.091 |
| | | |
| 3a. | Port | 563.892 |
| | Vracht | 60.057 |
| | Telefoon | 82.975 |
| | Telefax | 34.497 |
| | Kantoorbehoeften | 121.279 |
| | Bestuurskosten | 30.096 |
| | Secretariaatskosten totaal | 892.796 |
| 3b. | Accountant | 23.700 |
| 3c. | Reiskosten binnenland | 91.134 |
| | Reprezentatiekosten binnenl. | 68.153 |
| | Verblijfskosten binnenland | 51.865 |
| | Reiskosten binnenl. totaal | 211.833 |
| | Reiskosten buitenland | 62.087 |
| 3d. | Drukwerk circulaires | 500.696 |
| 3e. | Brochures | 33.291 |
| | Kosten persdienst | 62.736 |
| | Propagandakosten totaal | 96.027 |
| 3f. | Drukkosten Monato | 175.603 |
| | Verzending Monato | 405.657 |
| | Reclame Monato | 14.484 |
| | Honoraria Monato | 329.178 |
| | Redaktionele kosten Monato | 15.532 |
| | Drukkosten La Jaro | 25.557 |
| | Verzending La Jaro | 13.594 |
| | Honoraria La Jaro | 8.400 |
| | Drukkosten Horizontaal | 44.711 |
| | Verzending Horizontaal | 53.548 |
| | Drukkosten Vertikale | 4.033 |
| | Verzending Vertikale | 1.109 |
| | Drukkosten boeken | 170.553 |
| | Redaktie boeken | 17.500 |
| | Honoraria boeken | 9.324 |
| | Publikaties totaal | 1.288.783 |
| 3g. | Herstellingen machines | 13.672 |
| | Taksen e.d. | 6.210 |
| | Overige org. kosten totaal | 19.882 |
| | | |
| 5a. | Hulp- en leermiddelen | 73.973 |
| 5c. | Cursussen | 54.671 |
| 5d. | Manifestaties | 97.004 |
| 5e. | Aank. boeken voor verkoop | 327.319 |
| | | |
| 6a. | Toelagen | 5.000 |
| 6b. | Lidgelden | 27.219 |
| 6d. | Betaalde renten | 95.615 |
| 6e. | Stokvermindering boeken | 55.374 |
| | Stokvermindering uitgaven | 0 |
| | Stokvermindering cursussen | 35.254 |
| | Stokvermindering algemeen | 138.638 |
| | Koersverschillen | 0 |
| | Kosten vorig jaar | 9.106 |
| | Totaal diverse kosten | 238.372 |
| | | |
| | TOTAAL DER UITGAVEN | 8.543.280 |
| | | |
| 7. | Lidgelden | 88.219 |
| 8. | Advertenties Horizontaal | 24.555 |
| | Advertenties Monato | 51.589 |
| | Advertenties totaal | 76.144 |
| 9. | Tijdschrift Horizontaal | 3.887 |
| | Tijdschrift Vertikale | 1.198 |
| | Tijdschrift Monato | 1.824.627 |
| | Jaarboek La Jaro | 102.048 |
| | Boeken eigen uitgaven | 283.765 |
| | Boeken van derden | 464.123 |
| | Verkoop grafisch werk | 1.758.196 |
| | Tot. verk. boeken, tijdschr. | 4.437.844 |
| 13. | Toeristische activiteiten | 71.625 |
| 16. | Cursusgelden | 71.711 |
| 17. | Ontvangen renten | 21.982 |
| 18. | Giften | 306.783 |
| 20. | Subsidies (zie detail) | 1.305.618 |
| 23. | Inkomsten vorig jaar | 284.930 |
| | Inkomsten dit jaar ontv. v. j. | 92.737 |
| | Stokvermeerdering boeken | 0 |
| | Stokvermeerdering uitgaven | 525.838 |
| | Stokvermeerdering cursussen | 0 |
| | Stokvermeerdering algemeen | 0 |
| | Koersverschillen | 33.098 |
| | Gerecupereerd port | 776.752 |
| | Diverse inkomsten | 1.382 |
| | Andere inkomsten totaal | 1.714.737 |
| | | |
| | TOTAAL DER INKOMSTEN | 8.094.663 |
| | | |
| | Resultaat van het boekjaar | -448.617 |

**Estraro, 94.03.26**

Tuj post la ĝenerala jarkunveno la nova estraro kunvenas. Estas decidite jene dividi la taskojn:

Prezidanto: Wim De Smet
Vicprezidanto: Alex Humet
Sekretario: Johan Van Eeno
Estrarano pri financoj: Roland Rotsaert
Konsilantoj: Ingrid Lievens kaj Jacques Schram

La unua estrarkunsido de la nova skipo okazos dimanĉon la 10an de aprilo je la 14 h. 30 en la sidejo de FEL, Frankrijklei 140, Antwerpen. Paul Peeraerts estas invitita al tiu ĉi kunveno.

---

**Estraro, 94.04.10**

La nova FEL-estraro instalita antaŭ nelonge, unuafoje kunsidis, laŭ invito de sia prezidanto, en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno, la 10an de aprilo 1994, je la 14:30 horo.

Ĉeestis: Wim De Smet, prezidanto; Alex Humet, vicprezidanto; Roland Rotsaert, kasisto; Ingrid Lievens, kunsekretariino; Johan Van Eenoo, sekretario.
Kunĉeestis: Paul Peeraerts, direktoro de la Grafika Centro.
Ne ĉeestis: Jacques Schram, kvankam invitita.

**1. Alparolo far la nova prezidanto**
Malfermas la kunsidon Wim De Smet bonvenigante ĉiujn, kaj emfazante la strukturigan karakteron de ĉi tiu unua kunsido. Laŭkitime paroliĝos Esperanto dum la kunsidoj, tamen personoj havantaj problemojn esprimi sin klare per Esperanto, uzu sian preferan lingvon.

**2. Sinprezentadoj**
Dum sia sinprezentado Wim De Smet anoncis kelkajn punktojn gravajn laŭ li kiel bazo por efika estrara laboro:
- respekti ekzistantajn regulojn;
- adapti kelkajn strukturojn;
- pli konscie organizi kaj dividi la laboron;
- ne fari pli ol ni kapablas laŭ niaj financoj, homfortoj, tempo;
Prezentis sin ankaŭ la aliaj estraranoj kaj Paul Peeraerts.

**3. Ideoj pri ĝenerala agadstrategio**
Fiksi agadstrategion estas grava afero por nia nova estraro, kiun Wim De Smet postulas esti aktiva estraro, kun specifa rolo:
- plani kaj ekzekuti aŭ nepre apogi aktivecojn en Flandrio;
- integrigi sin en la ĝeneralan movadon (UEA) kaj BEF, kaj kulturi bonajn rilatojn kun ambaŭ.

Kiel bazo de nia agadstrategio Wim De Smet skizas la historion de FEL. Pliklariĝas la tasko de FEL kiel "tegmento" super la lokaj flandraj membrogrupoj kaj individuaj membroj. La celojn de FEL enhavas la statutoj. Wim De Smet denombras la jenajn:
- "reciproki": helpi la grupojn kiuj per siaj kotizoj subtenas FEL finance;
- informi pri Esperanto en la flandra regiono, varbi, enterpreni;
- kontaktoj kun asocioj eksterlandaj (ekz. UEA);
- konigi Flandrion kaj la Esperantomovadon en Flandrio per kontaktoj kun regionaj instancoj (ministerioj, instruistoj ktp).

FLEJA, la flandra asocio por gejunuloj, sendependa de, sed finance ligita kun FEL, kaj la ESPERANTO-CENTRO kiu integriĝis en kaj apartenas al FEL, ambaŭ siaflanke helpas FEL en ĝia agado.
Respondecas pri la Esperanto-Centro la administrantaro de FEL, do la estraro. FEL devas investi monon en la Esperanto-Centro. Krom la laboristoj pagataj pli kaj pli necesas volontuloj.
La estraro ankaŭ notu signalojn pri perdo de entuziasmo, motiveco, samideaneco ktp ĉe la gemembroj kaj grupaj kaj individuaj.
FEL tamen estas modela organizacio, danke al i.a. sia bona strukturo.
Post tiu pri-FEL-aj klarigoj, Wim De Smet emfazas, ke por efika agado necesas:
- klare divigi la laboron (FEL ne faru tion kio apartenas al la regiona aŭ loka laboro);
- havi regulajn kontaktojn inter la estraro kaj la administrantaro;





**Organigramo**

FEL

**ESTRARO**
Prezidanto: Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.99.49
Vicprezidanto: Alex humet
Van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem
Tel.: (03) 239.21.69
Sekretario: Johan Van Eenoo
Peperstraat 72, 8000 Brugge
Tel.: (050) 34.71.92
Financoj: Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97, 8000 Brugge
Tel.: (050) 33.00.04
Anoj: Ingrid Lievens
Oudebareelstraat 10, 9041 Oostakker
Ivo Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel.: (03) 440.30.92

**HONORA KOMITATO**
Emile Cortvriendt (+)
Diepestraat 29, 2060 Antwerpen
Tel.: (03) 232.44.30
Gérard Debrouwere (+)
Magdalenastraat 29, 8500 Kortrijk
Tel.: (056) 22.76.48
Fernand Roose
Sinte-Klaradreef 59, 8000 Brugge
Tel.: (050) 34.30.61
Edward Symoens
Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.62.66
Cesar Vanbiervliet (+)
Oudenaardsesteenweg 158, 8500 Kortrijk
Tel.: (056) 22.00.11
Jules Verstraeten
Sint-Bernardsesteenweg 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43
Gregoire Maertens
Prins Leopoldstraat 51, 8310 Brugge
Tel.: (050) 35.49.35

**KOMISIONOJ**

Financoj: Roland Rotsaert, Wim De Smet, Paul Peeraerts
Informado: Gerd Jacques, Wim De Smet, Ivo Durwael, Annie Bollaert, Eddy Raets
Eldona Agado: Alex Humet, Wim De Smet, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts
Internaj Aferoj: Ingrid Lievens
Instruado: Johan Van Eenoo
Domo: Ivo Durwael, Jacques Schram, Paul Peeraerts, Cor van Ekelenburg

**GRUPOJ/ADMINISTRANTOJ**

**ANTVERPENO**

**La Verda Stelo**
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Prezidanto: Jacques Schram
Hof Ter Bekestraat 49, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.86.02
Honora Prezidanto: Jules Verstraeten
Sint-Bernardsesteenweg 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43
Vicprezidanto: Henny De Ketelaere
Miroeusstraat 26, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.15.67
Sekretario: Lydia Kerremans
Fabiolapark 6, 2870 Puurs
Kasisto: Clara Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel (03) 440.30.92
Anoj: Ivo Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem
Tel.: (03) 440.30.92
Cor van Ekelenburg
Korte Van Sterbeeckstraat 7, 2060 Antwerpen
Administrantoj de FEL:
Jacques Schram
Hof Ter Bekestraat 49, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 237.86.02
Jules Verstraeten
Sint-Bernardsesteenweg 1078, 2660 Hoboken
Tel.: (03) 827.66.43
Ivo Durwael
Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem

Tel.: (03) 440.30.92
Cor van Ekelenburg
Korte Van Sterbeeckstraat 7,
2060 Antwerpen

**La Erikejo**
Douglaslaan 14, 2950 Kapellen

Prezidanto: Mireille Storms
Douglaslaan 14, 2950 Kapellen
Tel.: (03) 666.83.19
Vicprezidanto: Jorg De Mulder
Beauvoislaan 86, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.95.98
Sekretario: Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.83.19
Kasisto: Erhard Boehme
Plantinlaan 10, 2940 Stabroek
Tel.: (03) 664.40.47
Administrantoj de FEL:
Edward Symoens
Putsesteenweg 151, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.62.66
Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.83.19

## BRABANTO

**Esperanto 2000**
Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille

Prezidanto: Bert Vanhoven
Boerenkrijglaan 20, 3120 Tremelo
Tel.: (016) 53.58.92
Sekretario: Roger Goris
Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille
Tel.: (010) 86.01.12
Kasisto: André Wollants
Maleisenstraat 86, 3020 Herent
Tel.: (016) 23.74.18
Administrantoj de Fel:
Ghislain Jacobs
Kerkstraat 97, 3010 Kessel-Lo
Tel.: (016) 26.16.93
Roger Goris
Rue Ménada 44, 1320 Hamme-Mille
Tel.: (010) 86.01.12

## LIMBURGO

**Limburga Esperanto-Ligo**

Prezidanto: Jos Vandebergh
Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.19.43
Sekretario: Jef Geraerts
Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel.: (011) 22.59.12 (laborejo)
Kasisto: Albert Claesen
Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek
Tel.: (011) 32.36.03
Administranto de Fel:
Jef Geraerts
Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel.: (011) 22.59.12

**Beringen**

Prezidanto: Jos Lemmens
Maasheidestraat 7, 3580 Beringen
Tel.: (011) 42.26.36
Sekretario: Theo Geerdens
Schomstraat 53, 3582 Beringen-Koersel
Tel.: (011) 43.30.78
Kasisto: Theo Geerdens
Schomstraat 53, 3582 Beringen-Koersel
Tel.: (011) 43.30.78

**Hasselt**

Prezidanto: Marcel Aerts
Lazarijstraat 122, 3500 hasselt
Tel.: (011) 32.36.03
Vicprezidanto: Peter Berx
Havemarkt 39 bus 7, 3500 Hasselt
Tel.: (011) 23.30.93
Sekretario: Jef Geraerts
Boendersstraat 12, 3670 Meeuwen
Tel.: (089) 41.80.95
Kasisto: Albert Claesen
Zonnebloemstraat 13, 3590 Diepenbeek
Tel.: (011) 32.36.03
Ano: André Cuyvers
Heuvelstraat 2, 3941 Eksel
Tel.: (011) 73.18.01

**Houthalen**

Prezidanto: Jos Vandebergh
Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.19.43
Vicprezidanto: Leon Geysmans
Lariksenstraat 13, 3530 Houthalen
Tel.: (089) 38.17.77
Sekretario: Alfons Lijnen
Grote Baan 156, 3530 Houthalen





Tel.: (011) 52.20.74
Kasisto: Alfons Lijnen
Grote Baan 156, 3530 Houthalen
Tel.: (011) 52.20.74

## OKCIDENT-FLANDRUJO

**Paco kaj Justeco**

Prezidanto: André Dumarey
Blekerijstraat 32, 8310 Brugge-Assebroek
Tel.: (050) 35.48.13
Sekretario: Oliva Van Eeghem
Torhoutsteenweg 31, 8200 Sint-Andries
Kasisto: Gregoire Maertens
Prins Leopoldstraat 51, 8310 Brugge
Tel.: (050) 35.49.35
Administranto de FEL:
Johan Van Eenoo
Peperstraat 72, 8000 Brugge
Tel.: (050) 34.71.92

**La Konkordo**

Prezidanto: Jean Pierre Allewaert
Tarwelaan 10, 8500 Kortrijk
Tel.: (056) 20.07.96
Sekretario: Piet Glorieux
Werkenstraat 56, 8600 Werken
Tel.: (051) 56.90.30
Kasisto: Danielle Demeyere
Winterland 23, 8501 Heule
Tel.: (056) 35.55.35
Administranto de FEL:
Piet Glorieux
Werkenstraat 56, 8600 Werken
Tel.: (051) 56.90.30

**La Konko**
Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende

Prezidanto: Raymond Wylleman
A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende
Tel.: (059) 50.27.08
Vicprezidanto: Flory Witdoekt
Witte-Nonnenstraat 9A, 8400 Oostende
Tel.: (059) 70.29.14
Sekretario: Marc Cuffez
Elisabethlaan 295, 8400 Oostende
Tel.: (059) 80.85.17
Kasisto: André D'Hulster
Paul Michielslaan 10, 8400 Oostende
Tel.: (059) 80.06.95
Administranto de FEL:
Lucien De Sutter
Frère Orbanstraat 210, 8400 Oostende
Tel.: (059) 50.18.25

**Knokke**

Prezidanto: Albert Marmenout
Helmweg 7, 8300 Knokke-Heist
Tel.: (050) 60.55.35

## ORIENT-FLANDRUJO

**La Pioniro**

Prezidanto: Mari-Roza De Wolf
Botermelkstraat 100, 9300 Aalst
Tel.: (053) 78.26.04
Sekretario: Hugo Dossche
Asserendries 103, 9300 Aalst
Tel.: (053) 70.17.89
Kasisto: Clement Amant
Brakelstraat 52, 9300 Aalst
Tel.: (053) 21.31.56
Administranto de FEL:
Mari-Roza De Wolf
Botermelkstraat 100, 9300 Aalst
Tel.: (053) 78.26.04

**La Progreso**

Prezidanto: Katja Lödör
Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge
Tel.: (09) 230.16.77
Vicprezidanto: Patrick Haerick
Zilverberklaan 25, 9032 Wondelgem
Tel.: (09) 227.02.15
Sekretario: Ingrid Lievens
Oude Bareelstraat 10, 9041 Oostakker
Kasisto: Hans Delnat
J. Lambrechtstraat 8, 9000 Gent
Tel.: (09) 221.10.02
Administrantoj de FEL:
Katja Lödör
Peter Benoitlaan 117, 9050 Gentbrugge
Tel.: (09) 230.16.77
Ingrid Lievens
Oude Bareelstraat 10, 9041 Oostakker

## KOOPTITAJ ADMINISTRANTOJ

Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.99.49

Alex Humet
Van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem
Tel.: (03) 239.21.69
Piet Glorieux
Werkenstraat 56, 8600 Werken
Tel.: (051) 56.90.30
Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97, 8000 Brugge
Tel.: (050) 33.00.04
Ingrid Lievens
Oude Barelstraat 10, 9041 Oostakker

**ADMINISTRANTOJ-FUNKCIULOJ**

Paul Peeraerts
Baron Dhanislaan 13, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (ofichore)
Guido Van Damme
Haantjeslei 31, 2018 Antwerpen
Tel.: (03) 234.34.00 (ofichore)

**KUNLABORANTAJ ASOCIOJ**

**Flandra Esperantista Junulara Asocio (FLEJA)**
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Prezidanto: Jorg De Mulder
Marnixplaats 10. 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 666.95.98 (semajnfine)
Vicprezidanto: Bart Demeyere
Drift 26, 8420 Wenduine
Tel.: (03) 240.88.61 (ofichore)
Sekretario: Stefaan Cottenier
Veldstraat 49, 3001 Heverlee
Tel.: (016) 20.77.98
Kasisto: Wim Slootmans
J. Moretuslei 74A (G), 2610 Wilrijk
Tel.: (03) 820.24.54
Redaktoro JEN: Ilja De Coster
varendriejouter 47, 9031 Drongen
Tel.: (09) 227.86.64
Administranto de FEL:
Wim Slootmans
J. Moretuslei 74A (G), 2610 Wilrijk
Tel.: (03) 820.24.54
Komitatano de TEJO:
Jorg De Mulder
Marnixplaats 41, 2000 Antwerpen
Tel.: (03) 666.95.98 (semajnfine)

**Belga Esperanto-Federacio (BEF)**
Rue des Glacières, 6001 Marcinelle

Prezidanto: Georges Sossois
Rue du Basson 79, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.62.05
Vicprezidanto: Wim De Smet
Hertendreef 12, 2920 Kalmthout
Tel.: (03) 666.99.49
Sekretario: Philippe Van Damme
Rue du Brillant 21, 1170 Brussel
Tel.: (02) 673.75.96
Kasisto: Marcel Delforge
Rue des Glacières 16, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.14.13

**Association pour l'Esperanto (APE)**
Rue des Glacières 16, 6001 Marcinelle

Prezidanto: Georges Sossois
Rue du Basson 79, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.62.05
Sekretario: Roger Destabelle
Avenue Brunard 2, 6220 Fleurus
Tel.: (071) 81.25.48
Kasisto: Marcel Delforge
Rue des Glacières 16, 6001 Marcinelle
Tel.: (071) 43.14.13

**Belga Esperantista Fervojista Asocio (BEFA)**
Lucien De Sutter
Frère Orbanstraat 210, 8400 Oostende
Tel.: (059) 50.18.25

**Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)**
Raymond Wylleman
A. Vermeylenstraat 65, 8400 Oostende
Tel.: (059) 50.27.08

**Belga Ligo de Katolikaj Esperantistoj**

Hubert Audenaert
Beekstraat 6, 9160 Lokeren
Tel.: (09) 348.44.56

**Skolta Esperanto-Ligo - Belgio (SEL)**

Prezidanto: Arie Bouman
Driesdreef 8, 9030 Mariakerke
Tel.: (09) 227.48.41
Sekretario: Nico Boon
Merelhof 8, 3300 Tienen
Tel.: (016) 81.52.46





- havi pli regulajn kontaktojn kun la membraro.

Por tion akiri la estraro aprobas kaj akceptas la jenajn proponojn de Wim De Smet:
1) speciala rubriko en Horizontaal, en kiu la estraranoj prezentu sin laŭvice kun foto, por ke la legantaro pli bone konu ilin. Wim De Smet komencos.
2) eksperimenta starigo de ses komisionoj, ĉiu sub la respondeco de unu estrarano. La jenaj komisionoj stariĝis:
1. Financoj: Roland Rotsaert;
2. Domo: provizore Jacques Schram;
3. Informado kaj rebatado; Wim De Smet;
4. Instruado: Johan Van Eenoo;
5. Propraj strukturoj: Ingrid Lievens;
6. Maldirekta Agado: Alex Humet.
La komisionoj ne havas decidpovon, sed nur konsultas, avizas la estraron. Ĉiu respondeca estraro invitu personojn laŭ sia prefero membriĝi en sia komisiono, kaj raportas dum estrarkunsido pri la laboro de la komisiono.

**4. Eŭropaj elektoj**
Propagandi pri Esperanto kaj FEL:
1) Sabaton, la 7an de majo 1994, en Drongen (Salono Campmans): administrantara kunsido. Demando: ĉu iu konas politikan kandidaton por la Eŭropaj elektoj, kiu pretas diri aŭ fari ion favore al Esperanto? Se jes, por tiu kandidato ni propagandos.
2) La saman ni demandos al la belgaj politikaj partioj pere de letero, proponita de Wim De Smet kaj korektita kaj aprobita de la estraro. Roland Rotsaert urĝe zorgos pri la traduko de la germana versio de la teksto.

**5. Financoj**
Pro manko de tempo, tiu temo tre mallonge pridiskutiĝas. "Monato" havas 1.800 abonantojn (100 pli ol pasintjare). Tamen monmanko estas antaŭvidata.

**6. Horizontaal**
Restas nepriparolita pro manko de tempo.

**7. Librovendado**
Forŝovita al Komisiono 6.

**8. Problemoj en Limburgo**
Problemo: S-ro Mathieu Habex (grupo de Genk) vendas kotizojn je 350,- fr. (anstataŭ 600,- fr.) al la grupoj de Peer kaj Zonhoven. Tion menciis S-ro Jef Geraerts dum la lasta administrantarkunsido, demandante nome de tiuj du grupoj, ĉu ili rajtas ricevi Horizontaal kaj anonci sian programon en ĝi.
La problemo estas konsiderata sufiĉe grava, tiel ke la nova estraro ne sentas sin kapabla decidi pri ĝi pro manko de akurataj informoj. La estraro aprobas pri la enhavo de letero sendota (Johan Van Eeno) al s-roj Habex kaj Geraerts, invitante ilin al la sekvanta estrarkunveno.
La estraro provizore decidas ne konsideri la membrarojn de Peer kaj Zonhoven kiel membrojn de FEL, sed tamen sendi al ili Horizontaal.

**9. Administrantara kunsido**
Vidu sub 4.

**10. Venonta estrarkunsido**
Antverpeno (Middelheim), la 21an de majo, je la 15a horo. Alex Humet aranĝos pri loko sur la teraso...

**11. Diversaĵoj**
Konsilo de la Provinco Antverpeno
- Reprezentanto de FEL: Wim De Smet;
- Anstataŭanto: Alex Humet.
Komitatano de UEA: forŝovita al la sekvanta administrantara kunveno.
Reprezentado ĉe BEF: same.
Alex Humet ne povas iri al Seulo, sed Edward Symoens akceptis provizore anstataŭi lin.
La estraro estis decidinta, ke la programoj de la grupoj de Peer kaj Zonhoven estu publikigitaj en Horizontaal. Wim De Smet substrekas, ke la estraranoj havigu al la Grafika Centro mallongan biografion kaj foton por publikigo en Horizontaal.

Bruĝo, 15.04.94
raportis Johan Van Eenoo.

---

**Estraro, 94.05.21**

La estrarkunsido okazis sabaton la 21an de majo 1994 kaj komenciĝis je la 15a

horo sur la teraso de la restoracio apud la enirejo de la Middelheimparko kaj post interrompo pro pluvo finiĝis en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140 en Antverpeno.

Ĉeestis: Wim De Smet, Alex Humet, Roland Rotsaert, Ingrid Lievens, Johan Van Eenoo.
Senkulpiĝis: Jacques Schram.
Kunĉeestis: Paul Peeraerts, (dum parto de la kunveno:) Jef Geraerts (LEL) kaj Oliva Van Eeghem (Bruĝo).

Malfermas la kunsidon Wim De Smet, prezidanto, bonvenigante ĉiujn, speciale S-ron Jef Geraerts, kiun same kiel S-ron Mathieu Habex invitis la estraro por priparoli la limburgan situacion. Tiu temo pritraktiĝas antaŭ ĉiuj aliaj.

Mathieu Habex ne ĉeestas la kunvenon. Wim De Smet laŭtlegas leteron far tiu, ne tre klaran, el kiu la estraro komprenas, ke S-ro Habex
a) ne plu estas prezidanto de la grupo de Genk; estas do distingo inter tiu grupo (membro de FEL) kaj ĝia prezidanto;
b) ĉesas organizi Esperanto-kursojn.

La kotizoj de 350,- fr. pagitaj per S-ro Habex ne estas deziritaj. La estraro deziras, ke ĉiuj kiuj pagis kotizon tiamaniere ne estu konsiderataj kiel viktimoj de la situacio, kaj ankaŭ ne sentu sin tiel.

La estraro decidas, ke:
1) la personoj kiuj pagis per S-ro Habex la kotizon de 350,- fr. por 1994, esceptokaze estas akceptataj kiel anoj de FEL;
2) se montriĝos, ke S-ro Habex, post sia retiriĝo tamen entreprenus agojn embarasantajn la Flandran Esperanto-Ligon kaj/aŭ la Esperanto-movadon ĝenerale, la estraro decidos kion fari. Intertempe la estraro ŝarĝas L.E.L. (S-ron Jef Geraerts) regule informi ĝin pri la limburga situacio.
3) eventuale organiziĝos eksterordinara administrantarkunveno dum la Limburga Tago en Stokkem, la 20an de aŭgusto, dum kiu oficiale akceptiĝos kiel membroj de F.E.L. la grupoj de Peer kaj Zonhoven.
4) Wim De Smet sendos leteron enhavantan tiun decidon al S-ro Habex kaj prenos la necesajn kontaktojn.

**Oficiale tagordo**

**1. Aprobiĝas la raporto** de la estrarkunveno de 10.04.94 kun la jenaj korektaĵoj:
Art. 3: (Komisiono 2): provizore Jacques Schram;
Art. 8: Jef Geraerts;
Art. 11: Alex Humet ne povas iri al Seulo, sed Edward Symoens akceptis provizore anstataŭi lin.
La estraro estis decidinta, ke la programoj de la grupoj de Peer kaj Zonhoven estu publikigitaj en Horizontaal.
Wim De Smet substrekas, ke la estraranoj havigu al la Grafika Centro mallongan biografion kaj foton por publikigo en Horizontaal.

**2. Laŭtlegiĝas kaj aprobiĝas** la raporto pri la administrantarkunsido de 07.05.94 (Ingrid Lievens).

**3. Priparoliĝas la kritikoj/korektaĵoj** de la estraranoj pri la regularo de la komisionoj. La plej gravaj estas:
- 3b: Se mankas kandidato inter la estraranoj por prezidi komisionon, oni petos administranton fari tion. Tiu rajtas rifuzi. Tiam alia administranto estas petata, ĝis kiam iu kandidatos. La administranta komisionestro havas la samajn rajton kaj devigojn kiel estrarana komisionestro. Li/ŝi nur estos invitata al estrarkunveno, se pritraktiĝos sia komisiono.
- 4: Komisionoj kunvenu devigite po 1 fojon jare. komisionoj povas inviti eksperto(j)n, se necese. Ĉu tiuj ekspertoj estu membroj de F.E.L.?
Wim De Smet reverkos la tekston de la regularo.

**4. La Komisiono pri** Lokaj Grupoj, Membroj, Revuoj (prezidas Ingrid Lievens) sondu la opinion de la membroj de FEL pri Horizontaal kaj Vertikale.
La sekvonta numero de Horizontaal donos informojn kun foto pri ĉiuj estraranoj, kaj publikiĝos listo de la administrantoj.
La redaktoro de Horizontaal kiel eble malmulte ŝanĝu la tekstojn endonitajn por publikigo, kaj certe ne ŝanĝu tekstojn far politikistoj. En la kolofono aŭ ie alia estu menciita, ke la redaktoro ne respondecas pri la artikoloj ensenditaj.

**5. La eŭropaj elektoj**
FEL sendis al la flandraj politikaj partioj leteron petantan ĉu ilia(j) kandidato(j) estus preta(j) diri ion pozitivan pri Esperanto. S-roj J. Vandemeulebroucke, W. De Clerq kaj W. Courteaux jam respondis pozitive. Ĉe la nerespondintaj partioj ni ne plu insistos. La aliajn respondojn ni atendos ĝis la fino de majo.

Post la 5a punkto komencis la pluvego. Ni daŭrigis la kunsidon post 1 horo en la Esperanto-domo. Alex Humet ne plu povis partopreni.

**6. Rilatoj kun Esperanto-medioj** en Nederlando, Valonio, Bruselo ktp.
Roland Rotsaert proponas per aŭtomatigita sistemo memorigi la grupojn, inkluzive la nederlandajn, valonajn kaj bruselajn, sendi sian programon al Horizontaal.
Per letero U.F.E. invitas FEL partopreni en la Eŭropa-Unia Kongreso en Parizo je Pentekosto 1995 (2a ĝis 6a de junio). Paul Peeraerts respondos perletere, ke FEL ne organizos kunsidon tiam, ke FEL partoprenos en internacia kunsido, organizos standon pri sia Grafika Centro, kaj pretas esti peranto por kongrespagoj kaj anonci la kongreson per sia revuo "Horizontaal".
Pri la kunveno en Elspeet (23a ĝis 25a de septembro 1994) FEL decidos post la kunsido de la koncerna komisiono.

**7. La eventualan repagon** de vojaĝkostoj, telefonkostoj, poŝtkostoj por aktivuloj pristudos la Financa Komisiono dum sia kunveno en la 2a parto de junio.
La estraro decidas publikigi la tradukitan tekston de Claude Piron kaj aperigi ĝin en ĵurnalo. Oni elektas "De Morgen" kaj disponigas sumon de 25.000,- fr. Paul Peeraerts estas komisiata prizorgi la aferon.

**8. Hungara Esperanto-Festivalo**
Johan Van Eenoo demandos al S-ro Fernand Roose ĉu li ŝatus partopreni. La loĝado estos senpaga. La vojaĝon la partoprenonto en la Festivalo mem pagos.

**9. Propraj aranĝoj de FEL**
Rilate al la ekspozicio pri ĉina kaligrafio Johan Van Eenoo serĉis salonon en Bruĝo. Li turnu sin al Ivo Durwael.
La estraro ekceptas la proponon organizi maksimume po 3 fojojn jare, kaj ne ĉiam en Antverpeno, prelegon far fama, grava persono en Esperanto, kiu bone parolas kaj kiu povas pritrakti interesan temon. La organizontoj rajtos peti enirpagon.

**10.** Ne pritraktiĝis.

**11. Junularo**
Ne utilas laŭ la estraro estigi apartan komisionon pri junularo, ĉar jam ekzistas speciala organizo por la junularo (FLEJA). Tamen la junularo estos speciala tagordpunkto en la membro-komisiono.

**12. Subteno al Lieve Jacques**
Necesas pli da informoj por kapabli decidi pri tio. Tiu temo estos anoncata en "Horizontaal".

**13. Volontula laboro**
FEL precizigu kiajn taskojn povas plenumi volontuloj. Ni povas alskribi junajn senlaborulojn kaj/aŭ organizi tagon por volontuloj.

**14. Kulturaj ambasadoroj**
Interese estas, ke la flandra registaro subvencias kulturajn ambasadorojn por Flandrio.

**15. Konduto kaj arbitraciado**
Se problemo okazus, la estraro indikos kiel konsilantojn saĝajn spertulojn (ekz. G. Maertens, E. Symoens ktp).

**16. Siglo**
Nur se dek unu (11) administrantoj levigos novan diskuton pri la siglo de Esperanto (aŭ stelo aŭ la jubilea emblemo), la estraro rekonsideros tiun temon.

**17. Diversaj aranĝoj**
La 10an de junio vizitos la bruĝa grupo "Paco kaj Justeco" la ekspozicion pri mezepokaj manuskriptoj en la bruĝa biblioteko.

**18. La sekvonta estrarkunveno** okazos la 24an de junio je la 19:30 horo en la

Esperanto-domo, Frankrijklei 140 en Antverpeno.

**19. Diversaĵoj**
Menciiĝis kaj pripensiĝis la ebla aĉetado de jam uzata komputilo anstataŭ tutnova. Tio multe dependas de la financaj eblecoj de FEL.

Bruĝo, 11.07.94
Raportis Johan Van Eenoo.

---

**Estraro, 94.06.24**

Okazinta en la Esperanto-domo la 24an de junio 1994 ekde la 19:30a horo.

Ĉeestis: Wim De Smet, Johan Van Eenoo, Roland Rotsaert, Gerd Jacques anstataŭis Paul Peeraerts, direktoron de la Grafika Centro.
Senkulpiĝis: Alex Humet, Ingrid Lievens, Paul Peeraerts; Jacques Schram ne povis resti.

Wim De Smet malfermas la kunvenon bonvenigante ĉiujn ĉeestantojn.
Antaŭ la tagordo anonciĝis, ke la Komisiono pri la Esperanto-domo kunvenis la 17an de junio. Jacques Schram tajpos la raporton.
La 24an de junio kunvenis la Komisiono pri Financoj. Roland Rotsaert faros la raporton.

**Tagordo**

**1. Rimarkoj kaj korektaĵoj** pri kaj aldonaĵoj al la raporto pri la pasinta estrarkunsido:
La estrarkunsido okazis sabaton la 21an de majo 1994 kaj komenciĝis je la 15a horo sur la teraso de la restoracio apud la enirejo de la Middelheim-parko kaj post interrompo finiĝis en la Esperanto-domo, Frankrijklei 140, 2000 Antverpeno.
Oliva Van Eeghem kaj Jef Geraerts partoprenis parton de la kunsido.

En la diskuto antaŭ la oficiala tagordo:
La kotizoj de 350,- fr. pagitaj per S-ro Habex ne estas deziritaj.
1) La personoj kiuj pagis per S-ro Habex la kotizon de 350,- fr. por 1994, escept-okaze estas akceptataj kiel anoj de FEL;
3) Eventuale organiziĝos eksterordinara administrantarkunsido dum la Limburga Tago en Stokkem, la 20an de aŭgusto, dum kiu oficiale akceptiĝos kiel membroj de FEL la grupoj de Genk, kaj eventuale Peer kaj Zonhoven;
4) Wim De Smet sendos leteron enhavantan tiun decidon al S-ro Habex kaj prenos la necesajn kontaktojn.

Oficiala tagordo:
1. art. 11. Alex Humet ne povas iri al Seulo, sed E. Symoens akceptis provizore anstataŭi lin.
Paul Peeraerts petis aldoni, ke la estraro ne estis decidinta, ĉu la programoj de Peer kaj Zonhoven estu publikigitaj en Horizontaal.
3 La regularo pri la komisionoj montriĝas nekomplete pritraktita. La estraro decidos pri ĝi en sekvonta kunsido.
3.4 Ĉu ekspertoj estu membroj de FEL?
4. La redaktoro de Horizontaal kiel eble malmulte ŝanĝu la tekstojn endonitajn por publikigo ... En la kolofono aŭ ie alia estu menciita, ke la redaktoro ne respondos pri la artikoloj ensenditaj.
5. FEL sendis ... ĉu ilia(j) kandidato(j) ... S-roj J. Vandemeulebroucke, ... jam respondis ...

Post la 5a punkto komencis la pluvo. Ni daŭrigis la kunsidon post 1 horo en la Esperanto-domo. Alex Humet ne plu povis partopreni.

6. Per letero de U.F.E. ... (2a ĝis 6a de junio). Paul Peeraerts respondos perletere, ke FEL ne organizos kunsidon tiam ... Pri la kunveno en Eslpeet ... komisiono.
7. La estraro decidas publikigi la tradukitan tekston de Claude Piron kaj aperigi ĝin en ĵurnalo. Oni elektas "De Morgen" kaj disponigas sumon de 25.000,- fr. Paul Peeraerts estas komisiata prizorgi la aferon.
8. Johan Van Eenoo demandos al S-ro F. Roose ĉu li ŝatus partopreni.
9. La estraro akceptas la proponon organizi maksimume po 3 fojojn jare, kaj ne ĉiam en Antverpeno, prelegon far fama, grava persono en Esperanto, ... kaj kiu povas pritrakti interesan temon.
10. Ne pritraktiĝis.





13. FEL precizigu kiajn taskojn povas plenumi volontuloj. Ni povas alskribi junajn senlaborulojn kaj/aŭ organizi tagon por volontuloj.
14. Kulturaj ambasadoroj. Interese estas, ke la flandra registaro subvencias kulturajn ambasadorojn por Flandrio.
16. Nur se 11 administrantaj levigos novan diskuton pri la siglo de Esperanto ... la estraro rekonsideros tiun temon.

**2. Envenintaj korespondaĵoj**
a) Herman De Ceuninck: "De Groene Waterman". Al la komisiono pri Informado (Wim De Smet);
b) Bibliotheek voor varenden. Ĉu FEL donacos librojn? Al la Komisiono pri Informado (Wim De Smet);
c) "Vijf miljoen voor schoolprojecten". Al la Komisiono pri Instruado (Johan Van Eenoo);
ĉ) Letero de Vinilkosmo/Eurokker. Al la Financa Komisiono (Roland Rotsaert).
d) Letero de S-ro Habex. Vidu la punkton pri Limburgo;
e) Limburga Esperanto-Tago;
f) Anonco de la Valona Esperanto-Tago (26a de junio) en Gazet van Antwerpen;
g) Krekelsparen dankas. Al la Financa Komisiono (Roland Rotsaert).

**3. Eŭropaj elektoj**
La reagoj de la politikistoj kaj de niaj membroj estis nesufiĉaj. Tio estas por ni instruo. Nek la E-Centro nek la estraro estas sperta pri kontaktoj kun la gazetaro. La estraro konstatas malatenton, malintereson de la partioj kaj de la publiko, kaj la nespertecon de FEL en tiaj aferoj.

**4. Esperanto-Centro de FEL**
Wim De Smet jam priparolis kelkajn aferojn pri la teksto, kiun Paul Peeraerts redaktis laŭ demando de Wim De Smet. Roland Rotsaert opinias, ke FEL ne povas funkcii sen la Esperanto-Centro, sed la centro ja povas ekzisti sen FEL.
Wim De Smet levas la ideon estigi apartan asocion (sen profitcelo) por publikigi Monato-n. La Financa Komisiono pristudu kaj analizu tiun proponon. Roland Rotsaert verkos tekston por la Financa Komisiono + kopion (kiel studdokumenton) al la Komisiono pri Ekster-FEL-aĵoj (Alex Humet).

**5. Komisionoj**
a) La Komisiono pri Financoj jam kunvenis. Roland Rotsaert aldonos ĝian raporton.
b) Por la Komisiono pri Instruado (Johan Van Eenoo) kandidatiĝis Edward Symoens (prezidinto de ILEI), Henny De Ketelaere kaj Cor van Ekelenburg. La Komisiono konstatu antaŭ la fino de aŭgusto kiaj kursoj organiziĝos en Flandrio en la venonta jaro. Gerd Jacques havigos al Johan Van Eenoo la nomojn kaj adresojn de la nunaj instruistoj. Johan Van Eenoo telefonu al tiuj.
Wim De Smet kontaktos Alex Humet pri lia komisiono.

Aldoniĝas en la taskaro de:
- La Komisiono pri Informado: bibliotekoj kaj dokumetadaj centroj + bultenejoj;
- La Komisiono pri Financoj: decidoj pri investoj; buĝeti;
Tralegiĝis la teksto kun la taskoj de la komisionoj.

**6. Limburgaj grupoj**
La letero al la personoj kiuj membriĝis je 350,- fr. estas forsendita. Ne estas reagoj ĝis nun.
Envenis letero far S-ro Habex ĉe Wim De Smet: la estraro estas invitata al la lernejo "Ludoviko Zamenhof" en Polonio.
La situacio kun S-ro Habex ne multe ŝanĝiĝis ĝis nun.

**7. Regularo pri estraro kaj administrantaro**
Prokrastita pro manko de estraranoj kaj ĉar la ĉeestantoj malsufiĉe legis la tekston.
Roland Rotsaert estas tute kontraŭ tia longa, legenda kaj priparolenda teksto kaj deziras unupaĝan tekston. Wim De Smet opinias, ke la funkciado de estraro kaj administrantaro estu klare regulita. Laŭ Roland Rotsaert tia regularo estu pli ĝenerala - pri specialaj aferoj decidu la administrantaro - kaj li minacas rezigni pri sia estrara funkcio se tiu regularo ne estos unupaĝa. Estas por FEL laŭ li pli urĝaj aferoj pritraktendaj.

**8. Venonta estrarkunsido**
La 21a de julio, je la 15a horo, ĉe Wim De

Smet, Hertendreef 12, 2920 Kalmthout.

**9. Diversaĵoj**

a) Ricevos de la netaj enspezoj (28.000 fr.) de Krekelsparen:
- la oficistraro: 10%
- La Progreso: 8%
- La Verda Stelo
Esperanto 2000
La Erikejo: ĉiu 4%

b) Sonorilo daŭrigas laŭ la sama vojo.

Raportis Johan Van Eenoo

---

**Komisiono pri Eldonaĵoj, 94.12.03**

Kunveno je 3 decembro 1994, 15.00–16.15 h. en Esperanto-Centro, Antwerpen.

Ĉeestas: Wim De Smet, Ivo Durwael, Gerd Jacques, Grégoire Maertens, Paul Peeraerts, Roland Rotsaert.
Petis senkulpigon: Alex Humet.

Ankaŭ estis invititaj estraranoj de FEL, Torben Khelet kaj Stefan Maul. Ŝajne okazis eraro/forgeso en la dissendo de la invitleteroj.

Wim De Smet klarigas, ke la kunveno esploru la diversajn aspektojn/danĝerojn (skizitajn i.a. en tekstoj de Roland Rotsaert kaj Wim De Smet) kiujn alportas la eldonado de Monato por FE La komisiono donu konsilojn al la FEL-estrarkunsido, kiu okazos je 18 decembro 1994.
Wim De Smet ripetas, ke temas pri eblaj problemoj leĝaj, financaj, respondecaj kaj enhavaj. Li mallonge skizas la evoluon de Monato, de privata iniciato, tra eldono de UEA kaj ĝia grafika centro, ĝis la nuna situacio, en kiu FEL komplete respondecas pri la revuo. Li mencias, ke Monato en 1993 kaŭzis deficiton de ĉ. 140.000 frankoj, kaj ke verŝajne en 1994 ankaŭ estos deficito.

Paul Peeraerts disdonas superrigardon de la malnetaj rezultoj de Monato en la pasintaj jaroj (enspezoj minus elspezoj, sen salajroj kaj ĝeneralaj kostoj) kaj klarigas, ke salajroj kaj ĝeneralaj kostoj ĉiukaze estas pagendaj pro la ekzistanta dungitaro kaj ekipaĵoj, ankaŭ sen eldono de Monato:

1993: 790.057;
1992: 992.812;
1991: 833.931;
1990: 789.609;
1989: 808.003.

Roland Rotsaert atentigas pri la studodokumento, en kiu li konkludis, ke la riskoj pro Monato estas minimumaj kaj ke sen Monato FEL riskas ŝrumpi ĝis eta asocio. Wim De Smet replikas, ke tiu teksto ne forigis liajn timojn.
Grégoire Maertens provas doni klarigon pri la respondeco de membroj kaj estraranoj en kazo de problemoj, sed ne sukcesas.
Ivo Durwael demandas sin, ĉu en la nunaj cirkonstancoj valoras diskuti pri Monato. Pluraj ĉeestantoj opinias, ke ne.
Wim De Smet anoncas, ke li ne plu estas kandidato por la prezidanteco en 1995 kaj foriras je 15.23 h.

Grégoire Maertens klarigas, ke, laŭ la VZW-leĝaro, validas la jura personeco de asocio kondiĉe, ke la formalaĵoj (depono de membrolisto...) estas plenumitaj, t.e. ke membroj en tiu kazo ne persone respondecas. Estrarano respondecas en kazo de grava eraro, fraŭdo k.s., sed ne pro normala mastrumado, eĉ se temas pri "kalkulita risko".
Grégoire Maertens faras sugeston por limigi la riskojn per interveno de (restrukturigita) asocio Sonorilo: FEL vendas la titolon "Monato" al Sonorilo; Sonorilo transdonas (laŭ kontrakto) la tutan eldonadon de Monato al FEL kaj partoprenos en ebla (mal)profito de tiu eldono. Pluraj ĉeestantoj timas la administrajn konsekvencon kaj/aŭ dubas ĉu tiu proceduro vere forigas ĉiujn riskojn. Tamen, ĉar la estonteco de Sonorilo ankoraŭ estas necerta, ne okazas plia diskuto pri la propono.

Protokolis Roland Rotsaert.

---